

Trafa intervjuo pri JER kaj AMO-seminario

Fine de dimanĉo en la unua AMO-seminario okazis paneldiskuto, kiu krome havis rolon de forumo. La panelon konsistigis la tri tiam restintaj gvidantoj. Ekopunkto temis pri preparado por radia intervjuo. Ĉar la panela temo estis 'Elstaraj kaj malaj ekzemploj de nia uzo de komunikaj teknikoj' ni aŭdis diversajn spertojn ĉe radio- aŭ alispecaj intervjuoj kiuj realiĝis kun neatendita obstaklo. Oni (precipe hungarparolantoj) laŭdis la ĵus aŭditan 5-minutan intervjuon kun Zsófia Pataki pri la aranĝo JER, ĝia ligita seminario kaj pri Esperanto entute. La intervjuon dissendis Radio *Kossuth*, unu el la ĉefaj radio-stacioj de Hungario. La intervjuisto starigis bonajn, pozitivajn demandojn, Zsófia respondis memfide kaj flue, emfazante nunajn atingojn kaj realaĵojn – resume la intervjuo sekvis ĉiujn konsilojn donitaj en la koncerna semina program-fadeno.

La difino de la plej celinda aĝgrupo venis al diskuto: komuna saĝo estas tiuj inter 14 kaj 25-jaraj – ĉar ili ankoraŭ ne havas antaŭjuĝojn kaj pretas sorbi novaĵojn kaj entuziasmi pri ili. El la publiko venis kontraŭargumento, ke ni celu freŝajn pensiulojn, ĉar ili finfine havas tempon okupiĝi pri kio ajn, kaj ili en Esperanto povas atingi bonegan lingvan nivelon kaj tio unike per Esperanto atingeblas. Tio levis konstaton pri nia 'mankanta generacio' inter 30 kaj 50-jaruloj, kiuj okupiĝas pri kariero kaj familifondo, kaj ni aŭdis ideojn kiel igi tiujn homojn tamen ne plene malaperi, ekzemple per okazigo de allogaj aranĝoj por familioj.

Ni enrigardis la meĥanismojn laŭ kiuj novaj (sed bonaj) ideoj aŭ inventaĵoj estas akceptataj, unue de pioniroj, poste de ĉiam pli granda grupo de adoptantoj. Tiu temo estis pli detale konigita lunde, do en plia komuniko ni prezentos tiun analizon.

Fine de la panelumo, ni skizis kaj konkretigis la planojn pri disvastigo de la semina materialoj – pluraj el tiuj estas jam lokitaj en dumtempa vikiujo, poste ili trovos daŭran hejmon. Krome planatas ebloj por interaktiva diskutado – por ricevi raportojn pri atingoj de semina intencoj aŭ uzado de la lernitaĵoj. Plia plano estas la iom-post-ioma arigo el la sinsekvaj seminarioj de serio de Gvidiloj pri plej diversaj aspektoj de la evoluiga laboro, kiu praktike utilos al mezuma aktivemuloj.

La nuna teksto ne povas kovri ĉiun enhavon de la forumo. Komuniko pri la ceteraj programoj de la semina dimanĉo kaj lundo sekvos.

Vortoj: 375

(Postnoto: Kiom ni povas respuri, tiu promesita lasta komuniko neniam realiĝis, i.a. pro la preplaboroj por la tuje sekvanta estrarkunsido de UEA en Roterdamo).